

Duonjarcento de Sennacieca Asocio Tutmonda
Claude Gacond, 404-a radioprelego, 1971.07.07 & 10

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Tiun ĉi someron Sennacieca Asocio Tutmonda festos duonjarcenton de ekzistado. Ni partoprenos tiun jubileadon dediĉante kelkajn radio-elsendojn al la priskribo de la ĉefaj etapoj de la historio de SAT.

A.- La du unuaj paragrafoj de la enkonduko al la verko *Historio de SAT* eldonita en 1953 bone difinas la duecon de tiu ideologia movado. Ni citas ilin :

Cl.- « *Oni povas distingi ĉe la SAT-anaro du tendencojn manifestigantajn depost la ekiro de SAT ĝis la nuna tago, tendencojn nature fontantajn el la stadio, en kiu nuntempe troviĝas la homa evoluo.*

A.- *La unua celadis enkonduki en SAT la disputpunktojn, kiuj disigas sur la politika tereno la laboristojn laŭ diversaj partioj ; la dua persiste klopodas unuecigi, harmoniigi la mensan strebadon de la membraro konforme al la statuta formulo « per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado [SAT] celas malebligi ĉe siaj membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj. »*

Cl.- *La kreskado de la juna Asocio estis ofte perturbata de la sintrudemaj, iafoje bruaj manifestadoj de reprezentantoj de la unua tendenco. Tamen, post pli ol tridek jaroj*

A.- Nun ni povas diri post pli ol kvindek jaroj

Cl.- [post pli ol kvindek jaroj] *ni povas tiri la ĝojigan bilancon, ke la dua tendenco, la unueciga, la harmoniiga, triumfis dank'al la saĝeco de multaj gekamaradoj, kiuj praktikante esperanton konstante, sindonante kun fervoro al la taskoj starigitaj de SAT antaŭ ili, ekkonis, ke la SAT-idealo sin trudos venke nur dank'al sintezo de laborista pensado, kiu estas esprimita en la titolo de la Asocio per la vorto « sennacieca » kaj kiu rilatas same ankaŭ al la ideo de superpartieco. »*

A.- Fino de la citaĵo.

Cl.- SAT elkreskis sur la sama trunko kiel la ceteraj esperanto-movadoj ; ĝi estas frukto sur la arbo plantita de doktoro Zamenhof.

A.- SAT multon ŝuldas al la penso de la ĝenevano Hector Hodler, filo de la fama svisa pentristo Ferdinand Hodler, kaj fondinto de Universala Esperanto-Asocio. Tiu penso de Hector profunde influis tiun de Eŭgeno Lanti.

Cl.- Estas okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en Praha, organizata de UEA en 1921, ke SAT oficiale naskiĝis.

A.- Se UEA perdis grandan parton de sia ideologia forto post la unua mondmilito, tio estas grandparte pro la tro frua morto de ĝia inicinto Hector Hodler. SAT havis la privilegion povi resti longe sub la influo de la granda pensulo Eŭgeno Adam, pli konata sub la pseŭdonimo Eŭgeno Lanti.

Cl.- Zamenhof, Hodler kaj Lanti havis tre klaran filozofian komprenon de la historia rolo de esperanto. El tio ilia daŭra influo sur la movadon, kiu ĝermis el ilia pensado.

A.- Kiam ni atentege kaj sisteme studados la verkojn de tiuj tri pioniroj de la esperantismo, tiam ni malkovros, ke ili estas veraj pens-gigantoj, kiuj kapablis kompreni sian epokon multe pri bone, ol multaj tiamaj pensuloj, kies filozofioj estas oficiale instruataj al la nunaj universitatanoj. Kaj Zamenhof, Hodler kaj Lanti kapablis enkorpiigi sian penson en socian estaĵon.

Duonjarcento de Sennacieca Asocio Tutmonda
Claude Gacond, 404-a radioprelego, 1971.07.07 & 10

Cl.- Ne multas la pensuloj, kiuj tion kapablis fari. Marks, unu el la inspirantoj de la penso de Eŭgeno Lanti, estas verŝajne la plej frapa ekzemplo de tiu homkategorio.

A.- La nomo Sennacieca Asocio Tutmonda estas proponita en januaro 1921 en artikolo aperigita en *Esperantista Laboristo*, la organo de Liberiga Stelo, revoluciema societo, kies centro tiam troviĝis en Parizo.

Cl.- En tiu artikolo la sennaciistoj estas invitataj partopreni la Universalan Kongreson en Prago por fondi Sennaciecan Asocion Tutmondan.

A.- Pluraj artikoloj de *Esperantista Laboristo*, verkitaĵoj grandparte de Eŭgeno Lanti, skizis la ideologion de tiu naskiĝonta asocio. Jen ni legos al vi erojn el tiuj tekstoj, kiuj rilatas al la sennaciismo. Aŭdu :

Cl.- « *Estas nepre necese sin prepari, sin ekzercadi por la tasko de mondcivitano, forigante el si mem la nenaturajn naciajn ecojn, kiujn la ŝtata edukado metis dum nia infanaĝo en niajn kapojn kaj korojn.*

A.- *Ni ne devas malatenti la teruran spertadon de la mondmilito. Ĉu do la spektaklo travivita, ekzemple en Parizo kaj Berlino, komence de aŭgusto 1914, ne estas akra, ke eĉ la plimulto el la tiel nomataj internaciistoj entuziasmege kantaĉis militemajn kantojn ? Nur unu respondo estas akceptinda : tiuj individuoj ne sufiĉe estis antaŭe penintaj forigi el si mem la naciece malamindan edukadon enlandan.*

Cl.- *Oni jam riproĉis al Liberiga Stelo, ke ĝi « fermas la okulojn kaj obstine ne volas vidi tion, kio ekzistas. Ekzistas nacioj ! »*

A.- *Ne, tute ne, ni ne fermas la okulojn. Kontraŭe, estas pro tio, ke ni tiel malfermokule kaj enfunden rigardadis la malbonfaron de la nacioj, ke ni deziras krei organismon, kies esenca celo estos produkti antidoton kontraŭ la nacieco.*

Cl.- *Ĉar ni estas samlingvanoj, ni volas tuj profiti tiun rimedon por kvazaŭ embrie funkciigi societon, kiel povos estonte funkcii la universala socio. Pro tio ke la naciaj asocioj estas nun necesaj, el tio ne sekvas, ke ili devas esti la ĉelo de tutmonda asocio de samlingvanoj.*

A.- *Ni deziras, de nun, krei sennaciecan popolon. Ni volas, ke ĝi senprokraste kutimiĝu al eksternacia agado, pens- kaj sent-kapablo. »*

Cl.- Jen asertoj, kiuj pruvas, ke en 1921 la esperantismo ne plu estis lingva afero, sed jam socia fenomeno profunde enradikiĝinta en nia epoko. Kiel diris Eŭgeno Lanti, ĝi estis embrio. Tiu estaĵo naskiĝis de la semoj de Zamenhof kaj trankvile kreskis sub la vartado de agemuloj kiel Hodler kaj Lanti.

A.- La venontan semajnon ni daŭrigos nian historian skrizon pri SAT.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-